1-a Jaro, N-o 28 APERAS S.A.T. SEMAJNE 9. Aprilo 1925

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Redaktoro: N. BARTHELMESS, Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz | Gvidanto: E. LANTY, 24, Boulevard Beaumarchais, Paris XI. | Administranto: R. LERCHNER, Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz

Gvidanto de ĉina popolo Sun-Jat-Sen

(De *K. RADEK,* el Pravda, 14. marto 1925)

Sun-Jat-Sen — filo de malriĉaj gepatroj — naskiĝis en 1867 j. en provinco Kvantung, suda Ĉinio. Li naskiĝis 3 jarojn post tio, kiam angla majoro Gordon, gvidante la bandojn de eŭropaj aventuristoj kaj dungitaŭ armeon de la dinastio Man-Ĉju, sufokis la ribelon de tajpingoj. Kiam naskiĝis malgranda Sun, la fajroj ankoraŭ brulis, ankoraŭ daŭris partizana batalo, kiun gvidis restaĵoj de la ribelul-taĉmentoj. Ĉinio kuŝis sendefenda antaŭ la piedoj de fremdlanda kapitalo. Sole la ekonomia depresio, komenciĝinta baldaŭ en Eŭropo, gardis Ĉinion kontraŭ tuja disŝiro. Tra la tuta lando flarserĉis esploristoj de l' kapitalismo, studante ĝiajn riĉaĵojn, ĝiajn morojn, elektante la deir-punktojn de estonta ofensivo. Tra la malfermitaj havenurboj — Kanton, Ŝanĥaj — en la landon penetris influo de la kapitalismo, ampleksanta komence nur la apudmaran bordlandon. Pekina Kortego rigardis ĉi invadon kun profunda maltrankvilo. Regis senvolo en la popol-amasoj, kiuj perdis dum la tajpinga ribelo ĉirkaŭ tri milionojn da homoj, en tiuj popol-amasoj, kiuj perdis la esperon pri tio, ke ili povos per propraj fortoj liberiĝi de fremdula jugo kaj de la dinastio, kiu per sia burokrata aparato elsuĉadis fortojn de la lando. De la sudo ekmarŝis francoj kaj angloj, de nordo — Japanio. Inter ĉinaj scienculoj, orientiĝantaj en la internacia situacio kaj observantaj ĉiam kreskantan senvolon de la lando, komencas disvolviĝi la penso, ke nur reformoj savos la landon. En 1880 scienculo Kang-Ju-Vej preparas raporton, en kiu li montras, ke la ĉina burokrataro estas koruptebla, ne scias sian aferon, ke la lando disfalas je aro de satrapioj. "Tiukiu ĝis nun konservas la malnovajn metodojn kaj konceptojn, ne nur ne komprenas la ŝtatajn necesojn, sed malprok-



Sun-Jat-Sen

simiĝis de la grundo, de la konceptoj de antikvaj saĝuloj" — skribas Kang. Li montras reformojn en Japanio kaj deklaras, ke nur radikalaj paŝoj tiudirektaj povas savi Ĉinion. La gvidantoj de Pekina Akademio rifuzas konigi al la imperiestro la raporton de Kang; liaj pensoj al ili ŝajnas herezaj. Jes, Ĉinio perdis la malnovajn fortojn, sed ĝi havas la sole ĝustan sciencon de la granda antikva sia instruisto-Konfucio, kaj al ĝi ne povas esti danĝeraj eĉ la postmaraj barbaroj. Ĉinio venas al la milito kontraŭ Japanio. Ĉinio ne nur estas venkita, sed ĝia malforto, ĝia senforto estas montritaj al la tuta mondo. Estas traktita la malhonora por Ĉinio paco en Ŝimonoseki. En Pekino kunvenas granda konferenco de scienculoj por ŝtataj ekzamenoj. 29. majo 1895 Kang sin turnas kun dua memorandumo, en kiu li postulas reformojn de ĉinia burokrataro.

"Ĉiniaj burokrataj postenoj, — diras li en ĉi memorandumo, — estas okupataj ne de tiuj, kiuj scias kion necesas fari por helpi al kamparano kaj metiisto, ne de tiuj, kiuj scias administri la ŝtaton, sed de tiuj, kiuj povas pagi plej multe por la profitdona posteno. Unujn oni instruas pri ti-kio neniam estas aplikebla, aliuj ne aplikas ti-kion ili lernis." Li montras sur disvolviĝon de moderna industrio kaj komerco kaj postulas ilian favoradon en Ĉinio. Li postulas forigon de provincaj doganoj kaj helpon al kamparanaro. Sub influo de la milit-malvenko la ŝtatcenzuristoj transdonas ĉi-raporton al imperiestra vidvino kaj al ŝia filo — imperiestro. La imperiestro ordonas dissendi al guberniestroj la raporton por ke ili envivigu la reformojn; li intencas persone akcepti la reformiston, sed oni malpermesas al li tion, ĉar Kang-Ju-Vaj ne havas koncernan rangon. Sed Kang ricevas postenon en ministerio de sociaj laboroj kaj la rajton prezenti siajn raportojn; li verkas ilin unu post la alia, penante konatigi la dinastion kun la danĝeroj, minacantaj al la lando. Li montras minacon de la carismo kaj de Japanio en nordo, de Francio — en sudo, li montras la okupon de Kiau-Ĉao de Germanio. Nur kreo de moderna armeo povas savi Ĉinion. "De post

la malhonora malvenko en la milito kontraŭ Japanio, — skribas li, — eŭropaj ŝtatoj ignore rigardas nin, kiel homojn sovaĝajn, kaj ili traktas kun ni kiel kun stultaj vilaĝanoj; ili traktas nin egale kun la negroj. Iam ili malamis nin, kiel tro memfidan popolon; nun ili ridas super ni, kiel super stultuloj, blinduloj kaj mutuloj". De ĉiuj flankoj fremdlandanoj celas ricevi koncesiojn. "Ili postulas niajn ostojn, nian karnon; ili fortranĉas pecojn de nia korpo, ĝis nenio restos. Fremdlandanoj ricevas fervojajn koncesiojn. Al ni minacas la danĝero, ke de nordo al sudo oni tratranĉos al ni la gorĝon. Necesas memori la sortojn de Turkio, Koreo, Anamo kaj Polio". Kang verkas: "Rezonado pri reorganizo de Japanio", "Rezonado pri reorganizo de Rusio sub gvido de Petro la Granda", li verkas biografion de Petro la Granda kaj transdonas ĝin al la juna imperiestro. La imperiestro faras lin sia konsilanto kaj komeneas febrece akceli realigon en la vivo de la postulataj reformoj. Rajdas senditoj de la imperiestra palaco en provincon kun la ordonoj organizi gazetaron, lernejojn, reorganizi la armeon. Cent tagojn daŭras tiuj ĉi provoj reformi desupre. Burokrataro ekribelas kontraŭ ili. Ĉiuj ĉi reformoj devas levi la popolamasojn, limigi la burokratan arbitron kaj profitojn de la burokratoj. Kaj ja ĉiu ŝtatoficisto pagis multe por sia posteno. La plej influaj tavoloj de sciencularo, gardantoj de la antikvaj testamentoj, — vidas en ĉi reformoj atencojn kontraŭ la antikvaj instruoj. La burokrataj konspirantoj estas estrataj de la maljuna imperiestrino Csi-Si, kiu organizas ŝtatan renverson, arestas la junan imperiestron Hu-An-Sju, enŝlosas lin en riĉega palaco sur la insulo, kie li mortas, fidela al la instruo de Kang. En la historio ankoraŭ unufoje estis kontrolita la tezo pri tio, ke la reganta klaso ne povas sin mem reformi, ne povas rezigni je siaj priveligioj sen premo de la amasoj. Kang fugas eksterlanden, kaj Ĉinio putras plue, kiel viktimo de la propra burokrataro, kiel viktimo de eksterlanda kapitalo. La maljuna imperiestrino vidas la kreskantan malkontenton de popol-amasoj, penas direkti ĝin kontraŭ eksterlandanojn, subvencias organizon de la "boksist"-ribelo. Barbare subpremita de la internacia milita ekspedicio, la ribelo fordonas la senfortigitan kaj faligitan Ĉinion al eksterlandanoj. La dudeka jarcento komenciĝas sub la signo de divido de Ĉinio. La tuta internacia imperialisma literaturo de tiu ĉi tempo estas dediĉita al divido de Ĉinio inter imperialistaj ŝtatoj. La ekonomia ekfloro, komenciĝinta dum la lasta jardeko de XIX-a jarcento, puŝas Anglion, Germanion, Francion al serĉado de novaj merkatoj. La cara Rusio, timante malfrui, rapidas kapti Koreon kaj Manĝurion, estas preparata la rus-japana milito, kiu disvolviĝas sur la teritorio de Ĉinio. Ŝajnas, ke por Ĉinio forestas la savo.

En la sudo, kie ekestiĝis la ribelo de tajpingoj, de kie devenis la reformista Kang, kreskas kaj disvolviĝas Sun-Jat-Sen. Absolvinte popol-lernejon, li veturas al Hong-Kong kaj tie en angla lernejo studas medicinon. Juna, resentema, varm-kora Sun-Jat-Sen ne kontentiĝas per la scienco, li ĉirkaŭrigardas, li pensas pri la sorto de sia lando... La popola ribelo de tajpingoj penetrigas lin per malespero profunda. Kiamaniere la senlegipova popolo de Ĉinio povas batali kontraŭ la eŭropaj potencoj, armitaj per scienco kaj tekniko de moderno? Necesas, ke la popolo komence altigu sian kulturnivelon, lernu, kaj tiam ĝi egalos al la civilizitaj popoloj de la Okcidento. Sed kiamaniere malservutigi la popol-amasojn de Ĉinio? Sun, ne apartenanta al tavolo de scienculoj de Ĉinio, ne kredas renaskiĝon de Ĉinio per reformoj, memvole enkondukataj de la maljuna burokrataro, estrata de la lasta dinastio. Li venas al la konvinko, ke necesas forjeti ĉi dinastion, kiu prezentas per si la barbarajn manĝurianojn, konkirintajn Ĉinion en XVI-a jarcento. Li pensas pri konspiro, sed li trovas inter siaj konatuloj nur tri homojn, kiuj deziras sekvi lin laŭ tiu ĉi danĝera vojo. Li fondas dum la japan-ĉina milito Societon por renaskiĝo de Ĉinio. Komenciĝas propagando en la armeo, estas aĉetata armilaro. La konspiro fiaskas kaj 9. sept. 1895 estas ekzekutita Luko-Dun — kamarado de Sun-Jat-Sen. Sun-Jat-Sen fugas eksterlanden.

Komenciĝas la jaroj de elmigrado, la jaroj de mizero, la jaroj de lernado. La juna Sun vagas tra ĉiuj landoj, en kiuj vivas ĉinoj — tra Japanio, anglaj kolonioj, Ameriko kaj Anglio. Vivante per scienca laboro, per helpado de nemultaj siaj samideanoj, Sun serĉas interproksimiĝon kun ĉina junularo studanta eksterlande, kun ĉinaj komercistoj. Li atente studas aranĝon de eŭropaj kaj amerikaj ŝtatoj. Li vidas ke post kulisoj de bonstato de kapitalistaj landoj sin kaŝas mizero de la popol-amasoj. Li mem eliris el tiu ĉi mizero — ĝi ne estas indiferenta por li. Penetriĝante per simpatioj al socialismo, li konsideras, ke en Ĉinio la socialismaj celadoj estas antaŭtempaj, ĉar en Ĉinio ne ekzistas proletaro. Demokratio, kaj precipe la amerika demokratio — jen estas lia idealo de ŝtata aranĝo. Kaj la vojo al la idealo iras trans konspiro, unuavice trans la milita konspiro. La sperto de Kang konvinkis lin definitive pri senespero de la provoj reformi la landon dum dinastio de manĝurianoj. Sur kiun oni povas sin apogi? La renverson povas fari nur tiu generacio, kiu komprenas la neceson de demokratia reformo. Tia estas la studentaro kaj la milita junularo, kiu, studante la militscienco, konvinkiĝis ke ne estas eble savi Ĉinion sen rompi la malnovon. Sun-Jat-Sen direktas propaganditajn de li studentojn en Ĉinion, aranĝas ligojn kun garnizonoj, veturas el urbo al urbo, farante agitadon. Li orientiĝas en internacia situacio, palpas kontraŭdirojn inter kapitalistaj ŝtatoj, aranĝas ligojn en Japanio, esperante trovi la helpon en la lando, kiu mem, per decidaj internaj reformoj, sin savis de la eksterlanda kapitalo. Li trovas certan subtenon en Japanio, eĉ en registaraj rondoj, kie oni opinias, ke la propagando malfortigos jam sen tio disfalantan Ĉinion. Li trovas ĝin en kelkaj rondoj de Ameriko, esperantaj, kontraŭe, ke la revolucia movado devigos ĉinian registaron al reformoj kaj plifortigos, tiamaniere, Ĉinion. Ameriko sufiĉe forta ekonomie por ne timi konkuradon de aliaj ŝtatoj, elpaŝas tiam kontraŭ la penoj dividi Ĉinion, por la politiko de "malfermitaj pordoj", t. e. por allaso de alilanda kapitalo en Ĉinion sur egalaj por ĉiuj rajtoj.

La laboro de Sun-Jat-Sen kaj de liaj amikoj havas sukceson en la armeo. La parto de juna ĉina oficiraro, ricevinta eŭropan edukon, komprenis minacantajn al Ĉinio grandajn danĝerojn kaj aliĝis al la revolucia tendaro. La financa malaranĝo de la lando, vico da malsataj jaroj — ĉio ĉi penetrigas ribelemon en la armeon. En 1911 jaro ekfajras la ribelo en Uĉang. Ĝi vastiĝas, iras de unu venko al la alia. Sun-Jat-Sen rapidas el Ameriko tra Londono al Ĉinio. Tie ĉi li aperas kiel standardo de la ribelo. Kaj tial post ĝia venko, post renverso de la dinastio li estas elektata kiel prezidanto de Ĉinia respubliko.

Sun-Jat-Sen atingis sian celon. En Nankin kunvenas la parlamento. Sed la venko de Sun-Jat-Sen evidentiĝas lia plena malvenko. La dinastio de Man-Ĉju estas renversita, sed la tuta aparato, sur kiun ĝi sin apogis, la provinca burokrataro, la milita generalaro restis netuŝitaj, ĉar ekribelis nur la armeo, kaj la popolaj amasoj nur komencis moviĝi. En la parlamento trovas sian respegulon nur la inteligentularo. Grandaj potencŝtatoj, kiuj ne subtenis per pruntedono la falantan putran dinastion, ne pruntedonas ankaŭ al Sun-Jat-Sen, timante, ke la radika reformo en Ĉinio plifortigos ĝin, ke ĉina revolucio, estante plej danĝera pruvo pri influo de rusa revolucio, povas siaflanke influi Hindion, aziajn koloniojn de Francio. La internacia kapitalo unuiĝas kun ĉina burokrataro kaj kun ĉina generalaro. Juan-Ŝi-Kaj aperas kiel esprimo de tiu ĉi unuiĝo. Sun-Jat-Sen, ne povante kontraŭmeti al

Juan-Ŝi-Kaj iun realan forton, devis cedi al li la lokon kaj foriĝi de la direktado. La milita konspiro estis sufiĉe forta por forbalai la putrintan dinastion en centro, sed estis senforta por forbalai la reakcion en la tuta lando kaj purigi Ĉinion de la parazitoj, ĉirkaŭsidantaj ĝian korpon. La eksterlandaj potencoj donas prunton al Juan-Ŝi-Kaj. (Finota)

Elrusigis G. Demidjuk.

Ĝenerala Voĉdono en Belgio

(5. aprilo)

Post kelkaj tagoj[1]) okazos la ĝenerala voĉdono en Belgio. Belgio pro sia geografia kaj industria situacio multe impresas aliajn landojn, eĉ tre vastajn. Ĉiuj scias ke la socialista partio belgia estas unu el la plej fortaj en la mondo. Tiu partio fakte estas nun en gravega situacio. Eble baldaŭ ĝi devos regi en Belgio. Ĝi sin prezentas al la novaj balotelektoj kun 68 deputitoj, dum la katolika partio kun 77, la liberala partio kun 33. Aliaj etaj partioj havas 8 deputitojn. Ilia esenco estas burĝema. La laboristaro en sia granda plimulteco donis siajn voĉojn al la socialista partio en 1921. Nun la simpatio de la laboristoj ankoraŭ pliiĝis. Certa sukceso atendas la socialistan partion.

Kontraŭ kiuj devos batali la socialista partio? Ĝia ĉefa konkuranto estas la katolika partio kiu ankoraŭ kaptas la kredon de multaj proletoj. Tiuj proletoj ofte ne komprenas ke la kristanoj nur kreis sindikatojn kristanajn por kontraŭbatali la socialistojn kaj konsekvence la sindikatan movadon. La pastroj estas varmegaj propagandistoj, kaj en la lernejoj subvenciataj de la registaro kaj estrataj de monaĥoj, la profesoroj donas politikajn jurnalojn, instigante la gepatrojn de la lernantoj voĉdoni por la katolika partio, "la sola defendanto de la ordo!" Sed feliĉe tiuj manieroj ne plu tiom efikas. La laboristaro scias ke dank' al la socialista partio ekzistas multaj leĝoj protektantaj la laboristaron. Kaj ke la katolika partio havas nuran celon: detrui tiujn reformojn.

Alia partio: la liberala. Tiu partio kiu iam estis potencega, nun disfalas. Baldaŭ nur ruinoj restos da ĝi. Cetere ne plu estas kaŭzo por ke ĝi ekzistu. Ĝia iama programo estis esence kontraŭreligia; nun, ĝi kunlaboras kun la katolika partio en la registaro por kontraŭbatali ilian komunan malamikon: la socialistojn. Ilia kunlaborado estas despli sugestita. La framasonoj (la liberpensuloj!) kunlaborantoj kun la pastroj kaj k.io. Tiel efektiviĝas la antaŭvido de Karl Marx. Partio de l' laboro kaj partio de la kapitalistaro. Do la liberala partio kiu nun havas 33 deputitojn revenos post la ĝenerala voĉdono multe malpligrandigita. Sed al kiuj iros la voĉoj kiujn perdos tiu polviĝanta partio. Ni povas kredi ke parto el ili iros nekontesteble al la katolika partio; tiuj de la liberalaj riĉuloj kies unua penso estas: "la mono". Sed aliaj iros al la socialistaj listoj. Dum multaj jaroj la liberala partio estis esence demokrata. Ĝi batalis por pliigi la civilan instruadon, por mallongigi la militservon kaj kiam en 1913, la socialista partio organizis ĝeneralan strikon por akiri la universalan voĉdonon por ĉiuj junuloj pliaĝaj ol 21 jaroj, ili trovis aprobantojn en tiuj liberaluloj. Ni kredu ke tiuj sendiuloj komprenos la fiecon de la direktantoj de ilia partio kunlaborantaj kun la katolika financisto: Theunis. Do, laŭŝajne tiu partio iros parte al la socialista partio kaj parte al la katolika partio.

Ekzistas kelkaj aliaj konkurantoj inter kiuj ni notu la komunistan partion kiu havas en Belgio nur malmultajn anojn (la socialistoj havas 600 000). La laboristaro belgia nur bezonas unu partion. Ĉiuj eksterlandaj kamaradoj kiuj vizitis Gand'on okaze de la Kooperativa Ekspozicio Internacia antaŭ kelkaj monatoj, konsentas kun mi ke la laboro de niaj socialistaj kooperativoj estas modela. La belgia laboristaro volas estis sindikata, kooperativa kaj interhelpa. Por estri tion la partio devas esti firma.

La estonto estas plenpromesa. 5. aprilo alportos al la socialista partio venkon, eble venkon definitivan. *L. Bergiers.*

1) Kvankam voĉdono jam okazis — ĉi artikolo restas kaktuala aj koniginda. — Red.

La municipala batalo en Riga

La 28. februaro kaj 1. marto okazis en Riga balotoj al urba konsilantaro (municipalo), kiun partoprenis preskaŭ 90 % de la plenrajta loĝantaro. Kvankam la laboristaro en ĉi-jaro eniras la urban konsilejon iom pligrandiginta siajn vicojn, tamen la komuna situo ĝisnuna preskaŭ ne ŝanĝiĝas. Jen la tabelo de nunaj reprezentantoj (mi nur citas el 23 listoj tiujn, kiuj ricevis pli ol 2 sidlokojn):

	Nombro da voĉoj	Nombro da reprezent.
1. germanoj (dekstruloj) . .	28 953	15
2. mastruma grupo unuigita	6 668	4
3. nacia unuiĝo	13 686	7
4. progresistoj	10 094	5
5. mastrumkultura unuiĝo .	13 679	6
6. socialdemokratoj	56 839	29
7. hebrea bloko	6 860	4
8. profunioj	13 066	7

Rimarkinde pliiĝis la nombro de socialdemokratoj: 29 kontraŭ 18 ĝisnune, dum la profunioj estos reprezentataj nur per 7 kamaradoj, do ili perdis 6 sidojn.

Kie kuŝas la kialo? Ne pensu kvazaŭ Riga'aj profesiuloj indiferentiĝis aŭ batallaciĝis, — ĉu veraj socialistoj kaj konscia laboristaro, senhalte kaj kuraĝe paŝanta al sia nobla celo — liberigo de la homaro, povas iam laciĝi aŭ senkuraĝiĝi? Ne, neniam tio okazos, la konscio pri ilia praveco tion ne permesos. Sed malprosperon kaŭzis la ĉiam pli kaj pli kreskanta reakcio. Dum unu parto de la laboristaro, senkonscie apoganta kapitalistaron, ĝuas plenan liberecon, niaj konsciaj, agemaj kaj antaŭen paŝantaj kamaradoj estas severege persekutataj.

En Riga la profesiuloj eĉ ne posedas sian ĉiutagan gazeton. Gazeto "Laikmets" (La Tempo), elirinta ĉiutage dum proksimume 2 monatoj, estas malpermesita kaj la redakcio arestita. Semajna jurnalo de profunio "Veeniba" (Unuiĝo) post kelkaj monatoj de sia naskiĝo ankaŭ arestita kaj nune anstataŭita per "Stradneeku Veeniba" (Laborista Unuiĝo). Tamen kiel semajna ĝi malsufiĉas.

Do ni ne malkuraĝas, ĉar ni estas certaj, ke venos la tempo kiam ĉiuj kapitalistaj apogiloj ekŝanceliĝos kaj disfalos por neniam plu mallumigi la varmigan brileganta ruĝan sunon orientan. *3684.*

Granda lokaŭto en la metalindustrio de Cassel

La sindikatoj ĉiam penis ne interrompi la pacon en la ekonomia vivo post la milito. La entreprenantoj tute ne pensas je tio. Ili ĉiam nur metas la propran profiton super tiu ĉi paco, kaj ilia ĉefa zorgado estas forigi la ŝajnprofitojn de la "revolucio", kiu vere ne estis revolucio, sed bankroto de la Vilhelma epoko.

Inter laboristoj kaj entreprenantoj validis salajrtarifo kiu estis nuligita de ambaŭ partioj ĝis 31. januaro. Starigo de nova kontrakto ne povis okazi pro la pli malbonaj kondiĉoj flanke de la entreprenantoj, kiuj eluzis la senlaborecon kaj malfavoran situacion en tiu ĉi branĉo. Interalie ili proponis mallongigon de la ferioj, kaj nur laboristo, kiu plene laboris 275 tagojn, estus rajtigota ricevi ilin.

La laboristo, kiu estis 9 jarojn en sama laborejo kaj kuraĝis malsaniĝi dum 3 semajnoj, ne ricevus feriojn en tiu ĉi jaro, kaj en proksima jaro li nur estus rajtigota ricevi la feriojn, kiujn ricevus unu, kiu nur unu jaron laboras en la koncerna laborejo.

Tuj post fino de la valida tarifkontrakto la laboristoj de fabriko por optikaj instrumentoj, Hahn, starigis postulojn por salajraltigo, ĉar ili ricevis malpli da salajro ol kutime estas la salajro por tiu ĉi speco da laboro, pro malfavora situacio iama en tiu ĉi fabriko. Ĉar la situacio pliboniĝis, kion la firmo neas, la laboristoj deziris la altigon kaj ne ricevante ĝin ili komencis striki tuj.

Oni nun komencis intertrakti kune kun la leĝa komitato por forigi diferencojn inter partioj de laborantoj kaj labordonantoj, kiuj interligis nun tiun ĉi konflikton kun la starigo de nova tarifo kaj neis decidi pri altigo de la salajro ĉe la firmo Hahn. Oni nun fiksis ĝeneralan altigon de la salajro je 9 %. Ĉar la reprezentantoj de laboristoj ne povis interkonsenti kun la interligado de ambaŭ konfliktoj, ili forlasis la kunsidon, kaj la tarifkon-

trakto tamen estis validigita kaj la sindikatoj aranĝis balotadon, kiu rezultigis malakcepton de la tarifo kun 5920 kontraŭ 112 voĉoj.

Pro la daŭranta striko de la laboristaro ĉe la firmo Hahn la entreprenantoj nun decidis lokaŭton de la tuta laboristaro de tiu ĉi branĉo. En afiŝo ili publikigis la daŭron de tiu ĉi lokaŭto ĝis fino de la striko ĉe Hahn. La firmo nun serĉas strikrompantojn en la ĉiutagaj gazetoj per grandaj anoncoj, kiuj certigas bonan alveturon al la fabrikejo. *Dts. 264.*

El Svedio[1])

Depost Oktobra monato pasintjare la svedaj labordonantoj ĉiel estis ege atakemaj kontraŭ la laboristoj. Plurfoje la lokaŭtfrapilegon ili furioze svingis minacante. La laboristaj organizaĵoj tamen ĝis la 16. marto ĉi jare sukcesis deturni la frapon.

Pretekstante ĉesigi kelkajn malgrandajn strikojn la labordonantoj en la mezo de februaro minacis elĵeti el fabrikejoj kaj uzinoj per lokaŭto 130 000 laboristojn romponte validajn kun la laboristoj laborkontraktojn.

El okazigitaj intertraktoj nenio rezultis. Tiam la registaro (socialdemokrata) starigis komisiitaron por intertrakti en la konflikto, sed nenio helpis, la batalemo kaj impertinenteco de la kapitalistoj venkis, kaj la 16. marto estis lokaŭtataj 132 000 laboristoj.

Etas la plej grandampleksa lokaŭto, kiu iam okazis en Svedio. La ĉefaj profesioj, kiujn ĝi koncernas, estas jenaj: ferindustrio 40 000, teksindustrio 28 000, lignoseg-industrio 24 000, paper- kaj papermaterialindustrio 22 000 laboristoj ktp.

La senhontecon de la labordonantoj ja tio montras, ke la delegitoj de la laboristoj dum la traktado lasis tre signifajn cedojn, sed per tio ili eĉ ne estis sukcesintaj deteni la kapitalistojn de atako.

Neniu nun scias, kiel finiĝos tiu ĉi konflikto. Povus esti, ke la sveda laboristaro estos devigata fari ĝeneralstrikon. Estus la ĝusta respondo al tiaj fiagoj de kapitalistoj. La plej radikalaj el la laboristoj kaj laboristaj gazetoj propagandas por ĝi, sed la centra gvidantaro en la laborista landorganizacio ne emas al tio.

Jam antaŭe troviĝis en la lando ĉirkaŭ 40 000 senlaboruloj, kiuj ne povis trovi laboron, kaj nun la labordonantoj pensas uzi la malbonan situacion kontraŭ la laboristoj por malaltigi la salajrojn kaj, se eble, detrui laboristajn organizaĵojn. Kompare kun la altaj vivkostoj, la laboristaj salajroj jam estas nesufiĉaj, kaj nun oni volas ankoraŭ malplibonigi la staton.

Krom tio oni organizas strikrompantajn bandojn kontraŭ la laboristoj. Ŝajnas, ke ekblovas al grandaj bataloj sur la ekonomia kampo. Nur estonto montros, ĉu la laboristaj organizajoj povos sukcese rebati la nun tiel senhontajn atakojn de supersatigitaj kapitalistoj. *Karl Johansson (994)*

1) Tiu ĉi artikolo estas verkita 22. 3. Dume la lokaŭto finiĝis. Red.

Grava eksigo de l'segfabrikejaj lab-istoj en Transilvanio (Rumanio)

En la valo de rivero Maroŝ la segfabrikistoj la 6. marto eksigis el la fabrikejo 5000 lab-istojn, ĉar ili ne akceptis la 10-horan labortagon kaj 35% malplialtigon de l'salajro. — La antaŭaj okazintaĵoj estas jenaj:

La segfabrikejaj lab-istoj jam kvin jarojn havas kolektiv-kontrakton kun segfabrikistoj — labordonantoj. Kvankam ĉi-kontrakto multflanke malfavoris lab-istojn, tamen estis "certigata"(?) la minimala salajro — kaj okaze de plikariĝo de vivnecesaĵoj — proporcia plialtiĝo de l'salajroj. —

Por informi la tutmondan lab-istaron pri la ĉiutaga subniveliĝo de ĉi-lab-istoj sufiĉas citi fakton konvinkan, t. e. dum la prezo de l'panfaruno plialtiĝis je 175%, la salajro plialtiĝis nur je 5 (kvin) %.

La 13. dec. 1924 la fabrikistoj maldungis 1200 lab-istojn. Ilia motivo estis: ekonomia krizo! Ĉio-ĉi estis farita nur por prepari la vojon por iliaj aĉaj planoj. — Ili pensis ke pro la ĉiutage pligraviĝanta senlaboreco kaj pro tio, ke ili helpe de l'aŭtoritato, ĝendarmoj elloĝejigis la maldungitajn lab-istojn, ke la lab-istoj senkondiĉe akceptos iliajn postulojn. Kaj la 28. jan. 1925 la fabrikistoj sciigis la fakorganizaĵon, ke anstataŭ la 1. marto 1925 malvalidiĝonta kolektiv-kontrakto ili postulas, ke lab-istoj akceptu jenan kontrakton:

1. Labori 10 horojn potage, aŭ 35% malplialtiĝo de l'salajro. —
2. Ĉi-kontrakto malvalidiĝos la 31. dec. 1925 kaj ĝis tiam, la salajroj konstatotaj ne plialtiĝos. —
3. La salajroj de lab-istoj en Toplica, Galocás, Kelemenpatak estu malplialtigataj pohore je 25 banoj.[1])
4. La entreprenistoj ne plu provizos la lab-istojn per nutraĵoj. —

La rumana registaro la 13. junio 1921 subskribis la laborkonvencion, kiu "certigas"(?) al lab-istoj la 8 horan labortagon. Sed por ĉi-entreprenistoj aĉaj, por la "Sankta Profito" ne estas devigaj la leĝoj, tiuj leĝoj, kiujn eĉ mem la subskribinto — Rumanio — konsideras neplenumindaj. —

La 23. febr. 1925, komenciĝis la traktadoj, kiuj daŭris 10 tagojn. — La rezulto estis antaŭvidebla. — La lab-istoj ne akceptis, ĉar se ili estus akceptintaj la 1-an punkton, tiuokaze la tutlanda laboristmovado estus mortanta. —

La entreprenistoj vidinte, ke la laboristaro ne volas kliniĝi, la 6. marto 1925 matene eksigis el la fabrikejo 5000 labistojn.

Tamen la nombro de l'pere eksigitoj estas multe pli granda. Çar se ne laboras ĉi 5000, alia 10 000 ne havas lignaĵojn ekspedendajn, ne faligas arbojn, ĉar ne estas por kiuj, la ŝuisto ne havas laboron, ĉar oni ne povas pagi, la etkomercisto ne havas aĉetantojn ktp., ktp. . .

1) 1 lei = 100 bani (1 Us. dol = 200 lei).

La rumanan lab-istaron atingis ĉi-atako tiutempe, kiam furiozas la plej ega reakcio, blanka teroro, kiam Laboristaj Hejmoj estas sigelitaj, aliaj konfiskitaj por "Siguranta"-oj, kiam la plej eminentaj gvidantoj de l'unueca lab-istaro estas enkarcerigitaj, sed tamen, la tutlanda lab-istaro streĉas siajn fortetojn restintajn, ĉar ni scias, se ni malvenkus en ĉi-batalo, tio signifus la morton de l'Rumania lab. movado! *SAT-ano 1762.*

Striko de junuloj en Francio

Post 9 tagoj da batalo en ĉiuj grandaj urboj el Francio, la striko de l'junaj oficistoj de l'PTT finiĝis kun kvazaŭ plena sukceso. La registaro konsentis preskaŭ tutajn iliajn postulojn kiuj estis: "plialtiĝo de ilia mizera salajro".

Jen la rezultato akirita: ĝis 14 jaroj oni pagas nun 250 frankojn anstataŭ 125 fr.; de 14 ĝis 16 jaroj, 370 fr. anstataŭ 250 fr.; de 16 ĝis 18 jaroj 435 anstataŭ 300 fr., kaj 500 fr. por ĉiuj kiuj estas pli ol 18 jaraj.

Ni povas konstati kun plezuro ke tiu striko estas unu el la plej bonaj nunaj movadoj por la pliboniĝo de l'laborkondiĉoj. Estas por ni bona ekzemplo rimarki en tiu striko kiom da batalemo, da obstineco, la junaj "boulistes"[1]) alportis en sia movado en kiu regis plena unueco de la komenco ĝis la fino.

Dum unu semajno, de la 5. marto ĝis la 14., multaj mitingoj okazis kun fajra entuziasmo kiu pruvis al ni la intencon de niaj junaj strikistoj iri ĝis la venko. Estas energia leciono kiun la junaj poŝtistoj donis al siaj pli maljunaj kamaradoj. Tio estas bona premiso por la estontaj bataloj, kaj ilia agado estas imitinda kaj meditinda. *659.*

TRA LA KLASBATALO

En Riga okazas intertraktoj inter reprezentantoj de la armeaj ĉefstaboj de Latvio, Estonio kaj Polio. Duonoficiale partoprenas la armeestroj de Finnlando kaj Rumanio. Laŭ Moskvaj ĵurnaloj la celo estas ellaboro de komuna agplano okaze de milita konflikto kun Sovet-Unio.

Ĵus antaŭ la interŝanĝo de rusaj-polaj politikaj kaptitoj ĉe rus-pola limo pola soldato mortpafis du komunistajn oficirojn kiuj estis irontaj liberecen. Tiu ago estas la frukto de senmezura naciista agitado en Polio.

La balotrezulto en la unua balot-iro por elekto de germana regnoprezidanto donis jenajn nombrojn: Ricevis: Braun (soc. dem.) 7836 miloj, Held (bavara) 999, Hellpach (demokr.) 1582, Jarres (nacia) 10787, Ludendorff 284, Marx (katol) 3988, Thälmann (kom.) 1885.

Tankŝipo Saturn dum riparaj laboroj en Hamburga haveno eksplodis. Mortis dekunu personoj.

En karbmino Robeaux en Lotaringio pereis en minkatastrofo pli ol 50 minlaboristoj.

Reprezentantoj de la rusaj profunuiĝoj (RSI) ekveturis Londonon por interkonsiliĝi pri unuiĝo de la internacia sindikata movado. Gvidanto de tiu delegacio estas k-do Tomski.

1) Nomo de la junaj depeŝportistoj en Francio.

La kresko de laborista movado en Japanio

1. La strika ondo en 1924

La pasinta jaro 1924 montriĝis en Japanio riĉa je eksterordinara akriĝo de rilatoj inter la laboro kaj la kapitalo. Profunda mastruma depresio pezanta super la lando jam de 1920 j. kaj pliakriĝinta sub influo de l'tertremo en 1924 elvokas provojn de l'entreprenistoj transmeti helpe de malpliigo de l'salajro la pezon de l'krizo sur la laboristaron. La laboristaro de Japanio rezistas al ĉi provoj kaj la strikoj unu post la aliu eksplodas en ĉiuj industricentroj. Laŭ la nombro de strikoj kaj de partoprenantaj ilin laboristoj la jaro 1924 multe superis la antaŭajn jarojn, eĉ la rekordan ĝis nun jaron 1919. Kompare kun 1919, 1922 kaj 1923 la nombro de strikoj kaj de strikantoj estis en la pasinta jaro:

	1919	1922	1923	1924[1]
nombro de strikoj	497	250	263	689
nombro de strikant.	63137	41503	35127	78444

Do, la nombro de strikoj eĉ nur dum 10 monatoj de l'pasinta jaro estis multe pli granda ol dum tutaj 1922 kaj 1923 kune prenitaj.

La ĉefaj kaŭzoj de l'strika movado estas la konfliktoj je batalo, ĉu por la pliigo de salajro, ĉu kontraŭ ĝia malpliigo.

Laŭ la daŭro de konfliktoj la unuan lokon okupas la striko en la elektra kompanio "Nippon", kiu daŭris de 31. julio ĝis 22. sept. 1924; t. e. 53 tagojn. Ĉi-striko finiĝis per plena venko de laboristoj.

La venko de l'laboristoj de l'kompanio "Nippon" forte impresinta la tutan landon estas ŝuldata unuflanke al la solidareco de strikantoj (900 homoj agis kiel unu homo kun plena subteno de oficistoj) kaj aliflanke al eksterordinara subteno de la parto de laboristoj de aliuj elektraj entreprenoj. Kiam la kompanio "Nippon" provis transdoni siajn mendojn al aliuj parencaj entreprenoj, la laboristoj de ĉi-lastaj rifuzis plenumi ĉi mendojn.

El la konfliktoj finiĝintaj per malvenko de laboristoj estas menciinda la striko de tramvojlaboristoj kaj oficistoj en Osaka. La okazinta en novembro konferenco de l'delegitoj de komitatoj de l'tramvojlaboristoj kaj oficistoj de urboj Osaka, Tokio, Kobe, Nagoja kaj Kioto estis rezoluciinta la fondon de tutjapana federaĵo de tramvojlaboristoj kaj oficistoj.

II. La movado ĉe la laboristinoj

La movado ĉe la japanaj laboristinoj estas ankoraŭ tre malforta. Ĝis antaŭnelonga tempo la plimulto de virinoj laboris en la fabrikoj kaj uzinoj nur provizore ĝis edziniĝo kaj tial la profesia movado disvolviĝis inter ili sufiĉe malforte. Tamen de l'imperialisma milito t. e. de l'jaro 1914 la stato komencis ŝanĝiĝi. Kun pliarĝiĝo kaj plifortiĝo de l'industrio la laboristinoj transformiĝas iom post iom en konstantan klason de proletinoj, dependantaj en sia lukto por la ekzisto de siaj fabrikoj, uzinoj ktp. Rezulte, dum la lasta tempo la profesia movado inter la laborulinoj komencas pli kaj pli fortiĝi. En la nuna momento la tuta nombro de organizitaj proletinoj estas ĉirkaŭ 7500 t. e. ne pli ol 1% de ĉiuj japanaj laboristinoj.

La plej granda sindikato de laboristino estas "Sejva-kaj" nombranta 3800 aninojn. Ĝi estas unuiĝo sendependa. La ceteraj unuiĝoj de laboristinoj prezentas filiojn de ĝeneralaj laboristaj unuiĝoj. La plej grandan nombron el ili havas la Japana federaĵo de l'laboro, nome 2000.

La Japana federaĵo de l'laboro havis en 1919—1920 1500 aninojn kaj decidis organizi specialan sekcion por la virinoj kaj eldoni specialan organon por la laborulinoj. Tamen ĉi plano pro diversaj kaŭzoj estas prokrastata kaj dume definitive ne estas solvita. Ĝi estos denove pritraktata en la konferenco de l'federaĵo.

Tamen la ligo de Japana federaĵo de l'laboro de la regiono Kanto (la filio de l'japana federaĵo en la orienta Japanio) organizis virinan sekcion kaj en ĉiu numero de ĝia oficiala organo "Laboro" al ĉi sekcio estas dediĉata speciala paĝo.

Elrusigis *A. Levandovski.*

[1] 10 monatoj.

Ĉu la finlernintoj de viaj kursoj jam konas "Sennaciulo"n?

Sennacieca Asocio Tutmonda

Asocia Sideio: 23 Rue Boyer, Paris-XXe
Adm. Sekretariejo: Lerchner, Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz — poŝtĉeka n-ro 6835

OFICIALA INFORMILO

Celo: *Utiligi praktike la internacian lingvon Esperanto, por la klasaj celoj de la laboristaro tutmonda (vidi la Statuton).*

Pri la Va kongreso

Por eviti vanajn diskutojn ĉe la kongresejo, pri la debatendeco de la proponoj, ŝajnas utila represi ĉi-sube la artikolon 29 de la statuto (jarlibro 1924, paĝo 21): "Ĉiu ano aktiva de SAT rajtas sendi proponojn pri la agado de la Asocio al Komitato, kiu, post ekzameno, ilin publikigos en la oficiala gazeto, tiom kiom la spaco permesos. Principaj proponoj estos publikigataj almenaŭ en la antaŭlasta n-o de la gazeto aperanta antaŭ la kongreso."

Ĉiu SAT-ano, ĉiu SAT-rondo kiu volas prezenti proponon ĉe la V-a, devas do *senprokraste* sendi ties tekston al Ekzekutiva Komisiono (Paris - XX, 23 rue Boyer), kiu zorgos pri ties publikigo en Sennaciulo.

* * *

Ankaŭ ni atentigas pri la graveco de la artikoloj 25, 26, 27, 28. Necesas ĝuste kompreni la rolon de nia kongreso: ĝi celas, 1) ebligi larĝan, abundan debaton pri ĉiu debato (kio ja estas nepraktikebla per la gazeto), 2) kribri el ĉiuj proponoj tiujn, kiuj estas prezentotaj al ĝenerala voĉdono.

La E. K. de SAT.

Letero el Litovio

Ĉiu scias, ke klerikalismo estas afero de mezepoko, tamen en nia "kara" patrio ĝi ankoraŭ plene regas. Profesoro J. A. Herbaĉaŭskas, kiu estis por unu monato ekzilita el ĉefurbo Kaunas pro siaj liberpensaj paroladoj, estas vere dirinta: "Ĉe ni nur la necesejoj restis nekatolikigitaj".

Ĉiuj lernejoj sentas ungegojn de kristana demokrata politiko kaj diktatoreco. Socialistaj organizaĵoj en ĉiuj lernejoj estas plej severe ĝenataj kaj ie eĉ malpermesataj. La administrantoj timas precipe komunistan influon. Pro tio oni ĉesigis, laŭ ordono de ministerio por klerigo, la instruadon de rusa lingvo, por ke lernantoj ne povu legi ruslingvajn librojn. El lernejbibliotekoj oni forjetas librojn, koncernantajn sociordon, moralon, religion ktp., ekzemple en Ŝiaŭliai. Verŝajne oni deziras eduki lernantojn en azena mondkoncepto.

Cenzuro furiozas. Eĉ pacifistajn, novkristanajn gazetojn (ekz. "Atgimimas" — Renaskiĝo) oni konfiskadas post presado. Redaktoroj ofte estas administracie punataj pro presigo de diversaj artikoloj, anstataŭ direktiĝi al juĝejo aŭ postuli la revokon per gazetoj de koncernaj faktoj.

En politikaj aferoj regas blanka teroro. Laboristaj organizaĵoj kaj asocioj estas disigataj, arestoj estas nia ĉiutaga pano. Eĉ 15jarajn gimnazianojn oni arestas kaj diversmaniere turmentas, kvankam la leĝoj malpermesas turmentadojn. Ankaŭ infanojn oni opinias danĝeraj por la sendependeco. En ĉi-printempo okazos la proceso de 300 kulpigataj pro komunismo. Parto da ili estis kandidatoj al parlamento. Ankoraŭ multaj aliaj atendas en malliberejoj siajn verdiktojn. Malliberuloj ĉirkaŭ jaro kaj pli longe atendas siajn procesojn. Vivkondiĉoj de malliberuloj estas netolereblaj. Per malsatstrikoj ili estas devigataj postuli plibonigojn.

Parlamento antaŭ kelkaj jaroj decidis dispartigi la pli grandajn bienojn kaj disdoni la terpecojn al malriĉuloj. Sed ĉi-decido (terreformo) estas tre malvigle kaj maldece plenumata.

Ĉie aŭdiĝas voĉo de malkontento. La vilaĝanoj diras, ke sub cara regado estis pli bona vivo. Cetere, la regadesenco ne multe ŝanĝiĝis. En juĝejaferoj funkcias malnovaj caraj leĝoj. La plimulto ne kredas longdaŭran sendependecon de Litovio. Tamen klaskonsciiĝo progresas kaj socialisma movado ekvigliĝas. Bedaŭrinde, inter laboristoj mankas unueco kaj interkonsento. Sed ni esperas pli bonan estonton, kiun ni certe atingos per akra, streĉita batalo.

Kuraĝe, laboristoj!

Du estontaj SAT-anoj.

Se vi volas racie labori por via gazeto:
Varbu novajn abonantojn!
Varbu por la reklama parto!
Liveru konigindan materialon!

DISKUTEJO

Eklezio,-kristanaro kaj socialismo

La kristanaro, kiel ni kun ĝi konatiĝis, estas kapitalista ŝtat-kristanaro. Ĉie, kien enpenetras la ŝtato kaj kun ĝi la kapitalismo, ĝi alportas pastraĉojn, militarismon kaj alkoholon. Tiu ĉi trifolio — nigrovestitaj transmondkonsilantoj, hommurdanta subpremaparato kaj epidemio de alkoholo — estas la moderna signo de ĉiu civilizo. Oni tiel civilizas la popolgentojn negrajn. La tuta socio kapitalista estas trapenetrita de kristaj ideoj. Oni inspiras en lernejo, preĝejo kaj domo al infanoj kaj plenkreskintoj la ŝtatkristanecon. Ja, eĉ ekzistas kristanaj sindikatoj kaj partioj. Kaj la sindikatoj kaj partioj socialistaj deklaras la eklezian kredon kiel privatobjekton. Ĝis kiam la granda plimulto de l' masoj ne sin liberigos de kristaneco, tiel longe la kapitalismo kaj ŝtato bazas sur firmaj piedoj. Sen anima renovigo ne ekzistas nova socio (kaj sen ekonomia renovigo ne povas esti anima renovigo. — *Red.).*

Se ni anti-kristanoj volas konsideri la preĝkredon de la homoj, tiam ni rajtas insulti kaj primoki iliajn opiniojn kaj sentojn. Nur sistema kleriglaboro povas esti fruktedona. Volante krei socialan kulturon, ni devas likvidi la kristanecon. Tio memorigas al ni, ke ĝuste en nia periodo de ekonomia ĥaoso kaj granda mizero ĉe laboristaro, en ĉiuj eĉ plej ekstremaj anguloj aperas pseŭdokristoj kaj sanktuloj kun longaj haroj kaj plenbarboj, kun pli aŭ malpli lerta metodo drameca predikadas al masoj rezignon kaj asketismon. Kaj tiuj ĉi "sanktuloj" ĉie trovas emajn aŭskultantojn. Tra la masoj iras plej senkonscia, forta sopirado je savo el sub la mizeroj de l' vivo, sento por libero. Ili serĉas propran vivon kaj ne trovas la realan formon. Ili volonte deziras agadi kreante. Sed tia ligiteco en belo estas ebla nur en komunecoj, kiuj estas kuntenitaj de vere religiaj sentoj. Mem multaj ekonomiaj postuloj de l' laborist-organizoj do servas laste nur por krei la eblon je spirita okupiĝo de l' masoj, por povi esti kulture kreantaj. La lukto de l' laboristoj pro eble plej mallonga labortempo nur tiam havas sencon, kiam ĝi celas peri al la laboristoj pli altajn spiritajn bezonaĵojn. Vera religio montriĝas en la kreiva agado de l' masoj, en tio ke ili kulture okupiĝas.

Domaĝe devas esti konstatite, ke niaj tagoj estas plenigitaj de objektoj, kiuj absolute nenion havas komunan kun kulturo. La kapitalistoj kaj ŝtatestroj elpensis tutan reton da tiel nomataj popolgajigaĵoj, por teni la masojn en malklereco, por konservi la fiinstinkton kaj ĉiam denove ekveki. Boksbataloj, kino-, sport- kaj vetmanioj en ĉiuj grandaj kaj malgrandaj lokoj estas subtenataj de l' ŝtato. La milito spirite ruinigis la homojn kaj ilin enigis en la abismon de ĉiuj malvirtoj. Kaj la pastraĉoj, la reprezentantoj de dio sur la tero? Ili festis la venkojn de l' armeoj en ĉiuj landoj kiel ion de dio volitan. Ĉi-samaj pastraĉoj hipokrite babilas: Vi ne mortigu! La unuopa murdo ĉe ili estas mortpeko, sed la masmurdado, verko, kiu plaĉas al dio. La eklezio predikas al la masoj rezignon sur tero kaj promesas al ili ĉiel-ĝojojn post la morto. Kaj milionoj kredas ĉi tiujn ekleziajn mensogojn aŭ restas almenaŭ membroj de tiu sklavorganizaĵo, malgraŭ ke la pordoj de l' ŝtata eklezio estas malfermitaj por eksiĝo.

La natursciencо faris en lastaj jarcentoj tre grandajn progresojn; refutis la instruojn de l' biblia krehistorio jam de longe. Iam antaŭe la eklezia mondkoncepto estis la ligilo de l' homoj, ĉar la natursciencо ankoraŭ estis en embria stato. En tiu periodo la preĝinstruo ankoraŭ povis ege influi anime la masojn. La arto de l' estinteco montras en la pentrarto, muziko kaj konstruarto de tiu periodo la homan kulturfloradon. La alteco de kulturperiodo montriĝas ĉiam en la alteco de arto. Nuntempe la laboristmasoj staras plej ofte sen kompreno kontraŭ la artverkoj. Al milionoj da laboristoj mankas la ebleco mediteme aŭskulti la muzikverkojn de Bach, Beethoven, Wagner, Verdi, Ĉajkovski, Chopin ktp., dum ili ĝoje akceptas ĉiun stratkantaĉon. La kristana eklezio estis la anima ligilo de pasinta tempo. La socialismo devas celadi, la masojn nun anime detruitajn denove emancipi. Ni homoj estas parto de l' naturo. Kiam ni estas ne kontentaj pri la cirkonstancoj, tiam valoras ekkoni, ke la cirkonstancoj de homoj estas farataj. La homoj povas aliigi la cirkonstancojn, kiam ili estas homoj interne harmoniaj. Tiu-ĉi harmonio estas kreenda. Korpo kaj spirito same proporcie devas estis flegataj, nur tiele la homo sin povas formi harmonie. Nune ni vidas malĝentil-materialan trajton ĉe la masoj.

Socialistoj do devas formi nove la vivon, plenigi ĝin per nova esenco. Ne mirinde, ke nun la infanoj multoble rifuzas obeon al la gepatroj. Tio estas bona kiam okaze, la gepatroj la infanojn influas en laŭeklezia, vivmalama, grumbla sencoj. La gejunularo sin libere disvolvu. Sed ĝi ne devas ŝanĝi liberecon je impertinenteco. Ne sengvideco kondukas al libereco. La libereco estas bono karega, kiu malfacile estas venkonta. Nur tiu estas vere libera, kiu ne volas devigi aliajn sub sian ordonon. Sed kiu enpenetras en komunecojn, por efiki detrue, tiu neniom havas en si da liberemo, tiu efikas ruiniga al libero, tiu estas malutilulo, kaj li ne devas plendi pri sentoleremo, kiam li estos eksigita.

La kristanaro kreis la servutulon. La socialismo devas formi la libere kaj ĝoje kreantajn homojn. Ne disciplino, ordenoj, kaj frazoj devas esti la signoj de socialistaj komunecoj, sed agoj libervolaj, kiuj naskiĝas el sama karaktero post okazinta diskuto kaj sinkompreno reciproka. Ne multa babilado kaj ne la rezolucioj distingas la socialiston, sed lia kreemo por la komuneco.

Tiuj ĉi novaj komunecanoj devas akcepti la nunajn emojn al agado plej bone jam en la lernejo. Krei lernejojn, kiuj rifuzis la ŝtatkristanecon, estas grava tasko de socialistaj gepatroj. Tiaj lernejoj tute ne lasos ekĝermi ĉe la infano la eklezi- kaj aŭtoritatkredon blindan. Tiaj lernejoj efikos, ke eĉ la plej maljuna kaj plej saĝa homo konfesos, kiom tre malmulte li scias, eĉ kiam li ankaŭ povas paroladi pri multaj objektoj. Tiaj lernejoj (en senco de nia martiro Francisco Ferrer) kreos la vere liberecan, vivĝojantan spiriton, kiu povas alporti novan floradtempon de homa kulturo en la muziko, pentrarto, poem- kaj konstruartoj, estos atesto de nova komuneca koncepto, kiu nenion havas komunan kun la kristaneco kaj eklezio, laŭ la mondkoncepto de l' libereca socialismo. *Walter Preis, Breslau.*

RECENZEJO

Gazetoj

Represis artikolojn el S.: *Berg. Arbeiterstimme,* Solingen, 26. 2., let. el Rumanio (S. 19), *A Világ,* Targu Mureŝ, 18. 3., Senlaboreco en Aŭstrio (S. 15), *Hildesheimer Allg. Zeitung,* Hildesheim, 12. 3. kaj 18. 3., Notinda koincido, (S. 23) (fragmente), Voĉo el Polio, (S. 24).

Represo el SR.: *Solidaridad,* Buenos Aires, febr., Se mi estus patrino (aŭg./sept.).

Informilo de I. T. F., marto, enhavas la konatan esp. kolonon, en kiu ni i. a. legas denove insistan rekomendon al la k-doj, eklerni esp-on.

Esp. kurson komencis enpresi копейка, Ĥarkov (8. marto).

DIVERSAĴOJ

Tekniko kaj kapitalismo

Pri aŭtomata kuplaĵo de vagonoj.

En la januara numero de "S. R." k-do G. Pietsch raportis pri fervojteknika ekspozicio en Berlin, kaj tiuokaze li iom traktis la temon pri aŭtomata kuplaĵo. Li bone montris, kiel grava estas tiu afero por fervojaj laboristoj kaj li konkludis dirante: "Ĉi tiu postulo povos esti realigota sole je internacia bazo kaj interkonsento."

Hodiaŭ mi deziras sciigi, kiel en Francio la registaro intencas solvi tiun gravan problemon, unuflanke kaj sen okupiĝi pri la aliaj nacioj. Propono estis farita al franca deputítaro por devigi la fervojajn societojn provizi ĉiujn vagonojn per aŭtomata kuplaĵo (propono de 1. Januaro 1925).

La raporto ne diras eĉ unu vorton pri necesa antaŭa internacia interkonsento. Ĝi nur celas akceptigi al la parlamento la "kuplaĵon Boirault", kies provoj estas de nelonge faritaj. Sed, aliflanke, alia firmo proponas alian kuplaĵon, t. e. "kuplaĵo Henricot". Kaj tute certe oni longe diskutos por elekti ĉu tiun ĉi, ĉu tiun aparaton.

Tiel la internacieco de la afero estas tute forgesita, ĝi fariĝas disputo inter Boirault kaj Henricot. Kiu sukcesos? La fervojaj laboristoj tute certe ne profitos la disputon.

En ĉiu lando oni agas same; kaj kiam estos realigata tiu tre dezirinda reformo, ni havos en ĉiu lando malsamajn kuplaĵojn. Tiu malsameco tre malhelpos la tutmondan negocon, kiel jam okazis pri la vagonaj haltigiloj.

Pri la reciproka valoro de la aparatoj ni ne diskutu tie ĉi, sed ankoraŭfoje ni atentigu ĉiujn pri la kaosa kaj maltaŭga kapitalista organizado, kiu ne scias aŭ ne volas racie prepari iun ajn gravan laboron. *C. Roux, 835.*

Kiel la germana regnoparlamento la alkoholon kontraŭbatalas!

En la regnoparlamento estis farita flanke de la socialdemokratoj leĝpropono pri trinkejoj, kiu dum la traktado kaŭzis akran diskuton. La reprezentantoj de la dekstraj partioj kaj de la trinkejposedantoj atakis tre akre la leĝproponon; la mezaj partioj kaj la socialdemokratio estis por gravaj plibonigoj, tamen ne por la "sekigo de Germanio". La citita propono estis malaprobata 199 kontraŭ 165 voĉoj. 16 parlamentanoj detenis sin. Anstataŭ ĝi estis aprobata germannaciula propono, deziranta ŝirmon al la gejunuloj kaj malaprobanta la sekigon de Germanio.

Precizan konsideron meritas la voĉdono pri la unua propono, ĉar laŭ propono de soc-d. Sollmann laŭnome estis voĉdonata. La opinio de ĉiu opa p-ano pro tio nun estas konata.

Por la unua leĝpropono pri trinkejoj (socialdemokrata) voĉdonis:

El la germanpopoluloj	—
„ „ germannaciuloj	—
„ „ germ. popolpartianoj	1
„ „ ekonomia unuiĝo	—
„ „ bavaraj popolpartianoj	—
„ „ centro (katolikoj)	18
„ „ demokratoj	13
„ „ socialdemokratoj	112
„ „ komunistoj	21

La komunistoj ne plennombre ĉeestis.

El 31 inaj reprezentantoj 23 voĉdonis por kaj 1 (germannaciulino) kontraŭ. 7 detenis sin. *Daab.*

Edukista Internacio

Enketoj

1. *Eldonajoj porinfanaj.* Karaj gek-doj, ni petas, ke vi nin informu ĉu en via lando ekzistas revuoj, gazetoj eldonajoj destinataj al la infanoj de laboristaro. Konigu ilin al ni kaj diru kian kunlaboran helpon donas la avangardaj instruistoj al tia proletaria kulturo.

2. *Pri nuna pedagogio.* Ni anticipe dankas al la kamaradoj-instruistoj, kiuj raportos al ni pri la laboroj de la modernaj plej famaj pedagogoj el sia lando (verkoj, praktikaj efektivigajoj, influo sur la publikan instruadon . .).

Tiuj raportoj enhavu objektivan prezenton de la ideoj, rekomenditaj metodoj kaj finiĝu per kritiko. Kelkaj bibliografiaj notoj estus ankaŭ tre utilaj. Ni deziras atente pristudi ĉiujn gravajn verkojn ekaperantajn, kaj ankaŭ sekvi la provojn kaj eksperimentojn, la novmetodojn efektivigatajn en publika aŭ privata instruado.

Ĉi sube estas listo de kelkaj konataj pedagogoj, sed ni ja tre plezure akceptos artikolojn pri aliaj de ni nekonataj pedagogoj (Precipe koncerne Rusion, dokumentoj mankas al ni).

Belgio:	Decroly
Hispanio:	Ferrer
Francio:	A. Thierry, P. Robin, A. Binet, G. Lebon
Holando:	J. Ligthart
Italio:	Montessori, Salvoni, G. C. Ferrari
Portugalio:	Faria de Vasconcellos
Sovet-Unio:	Blondski, Krupskaja
Ameriko:	J. Dewey, A. Patri
Anglio:	A. S. Neill, E. S. O'Null
Germanio:	Gaudry, Kerschensteiner, Gansberg, G. Wyneken, P. Geheeb, B. Otto, P. Oestreich
Aŭstrio:	Schiller, Mann, Cizek
Svisio:	Claparède, Ferrière, R. Seidel, E. Oertli, H. Tobler
Svedio:	Abrahamson, Lonborg

Pedagogia sekretario de Eduk-Intern:

M. Van de Moortel, Maison du Peuple rue Joseph Stevens, *Bruxelles* (Belgio).

Alvoko

komunikita al ni de Tvera Virinfako, kiu praktike uzas esperanton por siaj internaciaj rilatoj.

Karaj kamaradinoj!

En la Internacia tago de laboristino, la tago de 8. marto 1925 j., ni, delegitinoj de la urbo Tverj, sendas nian varmegan fratinan saluton al vi laboristinoj de ĉiuj landoj, kaj ni sendas al vi sincere varmegan bondeziron atingi baldaŭan liberiĝon de la kapitalpremegado, de la burĝaro kaj de la inferaj mallibereјturmentoj en viaj landoj.

Kredu, karaj kamaradinoj, ke kunĉ kun vi, ni en malproksima por vi urbo Tverj, en libera Rusio, travivas ĉiujn malfeliĉojn kaj turmentojn, kiujn sendis al vi via sorto. Ni deziras, ke vi simile al ni, en la Internacia tago de laboristino pli intime kuniĝu kun komunista partio, ke vi aniĝu ĝiajn vicojn kaj ekkonsciu ties signifon, ĉar ekster partio ne ekzistas ebleco liberiĝi de tiuj teruroj, kiujn vi travivas.

Vivu la Rusia Komunista Partio, vivu Kominterno kaj laboristinoj, frantaj sub la standardo de Kominterno al hela estonteco, al plena tutmonda liberiĝo de virinoj.

La urba virinfako de Tverj tre dezirus ricevi sciiĝojn pri la vivo de laboristinoj en aliaj landoj.

Tvera virinfako de laboristinoj.

Берно: заб. тенотуенещ горрадкоща дкт.

Tverj (Sovet-Unio)

Sveda Esperantokongreso

La 11. kaj 12. julio Sveda Laborista Esperanto Asocio aranĝos sian duan kongreson en la urbo Uddevalla, Sudsvedio, apud Göteborg. Dum la kongreso okazos esperanto-ekspozicio kaj ekskursoj ktp.

Ni invitas kamaradojn kaj gesamideanojn de diversaj landoj partopreni. Se vi estas en Svedio je tiu tempo aŭ vi povas havi libertempon dum tiu tempo kaj volas pasigi kelkajn tagojn kune kun svedaj kamaradoj, bonvolu noti vin por partopreno. Ni salutas vin bonvenonte al Svedio. Skribu se vi venos, al Sveda Laborista Esperanto Asocio, Göteborg I.

Kun kamarada saluto!

Einar Adamson prezidanto. *Wilhelm Johansson* sekretario.

K. G. Karlsson kasisto.

Neŭtrala movado

Naciaj esp.-kongresoj okazos: 3. Kongreso de Iberaj Esperantistoj 10.—12. majo en Cordoba. 16. kongreso de britaj esp-istoj 31. majo en Leamington Spa. 10. kongreso de katolikaj esp-istoj 13.—16. aŭg. en Paris.

GEKAMARADOJ interkorespondantaj kun k-doj en Rusio el Hungario, Rumanio kaj Bulgario neniukaze faru senpere vian korespondadon al aŭ de Rusio, ĉar la blankaj fi-policoj kontrolaĉas, kaj ni facile povas esti punataj.

Oni nepre korespondu kun Rusio pere de iu k-do estanta en iu alia lando. *SPERTULO.*

Aĉetu akciojn de la Eldona Kooperativo!

Kropotkin pri rusa revolucio

(Daŭrigo)

Imperia Rusio mortis kaj ne plu reviviĝos. La futuro de diversaj provincoj, el kiuj la imperio estis kunmetita, kuŝas en la direkto de granda Federacio. La naturaj teritorioj de la diversaj partoj de tiu federacio estas tute distingaj por tiuj el ni, kiuj konatiĝis kun la historio de Rusio, ĝia etnografio kaj ĝia ekonomia vivo; kaj ĉiuj atencoj meti la konsistajn partojn de la Rusa imperio — Finlandon, Baltajn provincojn, Litovion, Ukrainon, Georgion, Armenion, Siberion ktp. sub unu centra regado estas certe kondamnitaj al fiasko. La futuro de ti-kio prezentis el si la Rusan imperion, estas nur en la direkto de federacio de sendependaj unuaĵoj. Tial estus en la intereso de ĉiuj, ke la okcidentaj popoloj deklaru anticipe, ke ili rekonas la rajton de memrego por ĉiu parto de ti-kio iam estis la Rusa imperio.

* * *

Kio koncernas miajn proprajn opiniojn pri la afero, ili iras ankoraŭ pluen. Mi antaŭvidas la alvenon, en proksima futuro, de la tempo, kiam ĉiu parto de tiu federacio prezentos mem federacion de liberaj kamparaj komunumoj kaj liberaj urboj; kaj mi ankoraŭ kredas, ke partoj de okcidenta Eŭropo baldaŭ sekvos tiun vojon.

Nun, kio rilatas nian ĉi-tempan ekonomian kaj politikan situon, — dum la Rusa Revolucio estas kontinuo de la du grandaj revolucioj en Anglio kaj en Francio, — Rusio provas nun fari paŝon antaŭen de tiu loko, kie Francio haltis, kiam ĝi sin ekvidis antaŭ realigo en vivo de ti-kio estis priskribata tiam, kiel *reala egalo (egalité de fait)*, t. e. ekonomia egalo.

Bedaŭrinde, la provo fari tiun paŝon estis entreprenita en Rusio sub la forte-centralizita *diktatoreco de unu partio* — de la social-demokratoj-maksimalistoj; kaj tiu provo estis farita sur la principoj, pruntitaj el la ekstreme centralisma kaj jakobena konspiro de Babeuf. Pri tiu provo mi devas malkaŝe diri al vi, ke, laŭ mia opinio, la provo konstrui komunistan respublikon sur la bazo de forte centralizita ŝtata komunismo, sub la fera regado de la partia diktatoreco, estas finiĝanta kun fiasko. Ni lernas en Rusio — *kiel komunismo ne povas esti enkondukata*, eĉ se la loĝantaro, superlacigita de la malnova reĝimo, prezentis nenian aktivan reziston al la eksperimento, farita de la novaj regantoj.

La ideo de sovetoj, t. e. de laboristaj kaj kamparanaj konsiloj, unuafoje proponita dum la revolucia provo en 1905 kaj senprokraste realigita de la februara revolucio 1917, tuj kiam la cara reĝimo falis, — la ideo de tiaj konsiloj, kontrolantaj politikan kaj ekonomian vivon de la lando — estas granda ideo. Des pli, ke ĝi nepre kondukas al la ideoj de tiaj konsiloj, formataj el ĉiuj, kiuj *efektive partoprenas* en la produktado de naciaj riĉaĵoj per siaj propraj, personaj fortoj.

Sed ĝis kiam la lando estas regata de la partia diktatoreco — la laboristaj kaj kamparanaj konsiloj evidente perdas tutan sian signifon. Ili estas reduktataj al la pasiva rolo, ludita siatempe de "Ĝeneralaj Ŝtatoj" kaj Parlamentoj, kiam ili estis kunvokataj de la Reĝo kaj estis opozontaj al ĉiopova Reĝa Konsilo.

Laborista Konsilo ĉesas esti libera kaj valora konsilanto, kiam ne ekzistas libera gazetaro en la lando, — kaj ni estas en tia stato preskaŭ du jarojn, la ekskuzo por tiuj kondiĉoj estante la stato de milito. Pli ol tio, la kamparanaj kaj laboristaj konsiloj perdas tutan sian signifon, kiam neniu libera elekta agitado antaŭiras la elektojn, kaj la elektoj estas farataj sub la premo de partia diktatoreco. Certe, la kutima ekskuzo estas, ke diktatora regado estis neevitebla, kiel rimedo por kontraŭbatali la malnovan reĝimon. Sed simila regado evidente fariĝas terura retroiro tuj kiam la Revolucio transiras al la konstruado de nova Socio, sur nova ekonomia bazo: ĝi fariĝas la morta verdikto por nova konstruaĵo.

La sekvendaj vojoj por faligi la jam malfortiĝintan registaron kaj okupi ĝian lokon estas bone konataj en historio — antikva kaj moderna. Sed kiam venas momento por konstrui tute novajn formojn de vivo — speciale novajn formojn de produktado kaj distribuo — sen havi iun ajn ekzemplon por imiti; kiam ĉio devas esti ellaborata de la homoj sur la loko, — tiam ĉio-pova centralizita registaro, kiu entreprenas provizi ĉiun loĝanton je ĉiu lampoglaso kaj je ĉiu alumeto por lumigi la lampon, — manifestas sian absolutan nekapablon fari tion per sia aparato, — tute egale kiom sennombra ĝi estu, — ĝi fariĝas malutilo. Ĝi disvolvas tian teruran burokratecon, ke la franca burokrata sistemo, kiu postulas la intervenon de kvardek oficistoj por vendi arbon, faligitan de ventego sur publika vojo, — fariĝas kompare bagatelo. Tion ni nun lernas en Rusio. Kaj ĝi estas tio, kion vi, la laboristaro de okcidento, povas kaj devas eviti per ĉiuj rimedoj, ĉar vi zorgas pri la sukcesoj de socia rekonstruo kaj sendis tien-ĉi viajn delegitojn por vidi, kiel socia revolucio laboras en reala vivo.

(Finota)

KRONIKO

Francio.

Lyon. Dimanĉon 22. marto, okazis propaganda festo organizita de la Lab. Esp-ista Grupo. Ne estis eldonitaj afiŝoj, nur aperis komunikajoj en la gazetaro anoncantaj la feston, tamen ĉeestis pli ol 200 gelaboristoj kiuj tre interesiĝis pri nia afero. Ekspozicio de gazetoj, revuoj, dokumentoj pruvis ke helplingvo esperanto ne estas frenezaĵo, vanaĵo sed tre grava kaj ja utiligata lingvo en ĉiuj medioj.

En la koncerto estis esperantlingva parto tre aplaŭdita de la esp.istaj kamaradoj. Meze de l' festo, k-do Marcel Roux, sekretario de la grupo, faris duonhoran paroladon klarigante kial la laboristoj devas lerni kaj uzi esp-on por internaciaj rilatoj de l' proletariaro. Aplaŭde ĉiuj ĉeestintoj konsentis pri nia praveco. Multaj lernlibroj kaj broŝuroj estis venditaj.

La loka gazetaro detale kaj favore raportis pri tiu festo kies granda kaj neesperita sukceso bone aŭguras nian Federacian Laboristan Kongreson kiu okazos en Lyon dum Pentekosto kaj la grandan belan feston de l'30. majo dediĉita al la kongrespartoprenontoj.

Jam ĉi-lastaj povas rilatiĝi kun k-do Marcel Roux, 90, rue Boileau, Lyon (Francio).

Germanio.

Cassel. Ni ricevis komence de la jaro peton aranĝi kurson inter la gimnastikuloj-laboristoj de Immenhausen, apudurbeto de Cassel. Nun en tiu ĉi urbeto nia ideo komencis kreski kaj ni esperas konvinki ĉiujn partoprenantojn de la sennacieca ideo kaj espereble ili bone uzos la lingvon okaze de la olimpiado laborista en Frankfurto. Ili esperas trovi tie multajn esperantistajn sportemulojn. Ĝis konatiĝo en Frankfurto! La kurson gvidas K-do Gogolin.

Italio.

Milano. Proletara Esperantista Grupo. La 30. marto finiĝos la kurso gvidita de k-dino Zanetta; kaj la 6. aprilo oni komencos alian unuagradan kurson, gvidotan de k-do Virĝilio Bellone. La grupo daŭras kunveni ĉiulunde vespere, de la 9. ĝis 10. h. en la lernejsalono de la "Università proletaria" *Via Manfredo Fanti 19.*

Sovet-Unio.

Ekaterinoslav. Estingita dum militoj kaj revolucio ekaterinoslava movado nun denove reviviĝas. Jam riĉa per esp-istoj nia urbo je komenco 1925 disponis nur pri tri personoj. Sed, bedaŭrinde, eĉ ĉi-esp-istoj, kaŭze de multaj kaj diversaj cirkonstancoj, ĝis nun ne povis aktive labori.

Antaŭ du monatoj, kun helpo de partiaj rondoj, propaganda laboro per esp. kaj varbado de SAT-anoj ekiris per rapidaj paŝoj. Post mallonga tempo ni havas jam 13 aktivajn laborantajn — ne nur pagintajn membropagon — Satanojn kaj 40 aŭskultantojn de du esp-taj kursoj, aranĝitaj ĉe medicina universitato kaj urba partia klubo.

Tial ke ĉiuj aŭskultantoj estas partianoj, ni havas rajton esperi, ke estontaj esp-istoj helpos efektivigi jenan programon:

1) Aranĝo de esp-aj ĉeloj ĉe ĉiuj prof-uniiĝoj kaj grandaj fabrikoj.
2) Unuigo de lastaj en centra esperanta organizaĵo ĉe urba partia klubo.
3) Ĉeesto al SAT-kongreso, kie unu el la plej aktivaj laborulmasoj de Rusio havos eblecon partopreni mondan sennaciigmovadon. *Kursgvidanto Sorokin N.*

KORESPONDADO

TARIFO

Korespondado: Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0,50 mk. or., ĉiu plia linio la samon.

Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.

MALLONGIGOJ: L = *letero.* PK = *poŝtkarto.* PI = *poŝtkartoj ilustritaj.* PM = *poŝtmarkoj.* bfl = *poŝtmarko sur bildflanko.* k.ĉ.l. = *kun ĉiuj landoj.* esp.aĵo = *esperantaĵo.*

Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

Aŭstrio.

— K-do *Johann Wutte, Admont, n-o 136,* Stirio-Aŭstrio, dez. koresp. k. ĉ. l. interŝ. vidaĵojn.

Bulgario.

— K-do *Kosta Penĉev,* str. Ĉehlarska, 668, *Ŝumen,* dez. koresp. pri lab. k. esp. movadoj, fervojoj, interŝ. PK, PI, fot-aĵojn, esp-aĵojn k. ĉ. l. krom Germanio.

— K-do *Ljuben Kasĉiev,* str. Ĉehlarska, 670 *Ŝumen,* pri div. temoj, k. ĉ. l.

— K.do *Ivan Ĝelev,* str. Kalekova, 553, *Ŝumen,* PI, fot-ajojn, k. ĉ. l.

— K-do *Stojan Miĥajlov,* str. Car Osvoboditel, 672, *Ŝumen,* pri pedagogio, filozofio k. okultismo, k. ĉ. l.

— K-do *Georgi Atanasov,* str. Otec Paisi, 20, *Ŝumen,* pri div. temoj k. ĉ. l.

Germanio.

— K-do *Martin Suckfüll,* Gutleutstr. 204, *Frankfurt a. M.,* (SAT-ano 1056) pri ĉ. temoj, PI, PM, bfl, certe resp.

— K-do *Rudolf Böhme,* Brennerstr. 12, ptr., *Weimar,* (SAT-ano 3765) serĉas koresp. pri social. movado k. aliaj temoj, L, PI, ĉiam resp.

— K-do *Kurt Klotzsch,* Külzschauerstr. 4, *Eilenburg,* dez. koresp. pri ĉiuj temoj, k. ĉ l.

— K-doj el finiĝanta "Elementa Kurso" gvidata de k-do Köckeritz, dez. koresp. k. ĉ. l. Skribu al k.do *P. Köckeritz,* Tharandter Str. 6, *Dresden-A 28.*

— K-do *Karl Lob,* Königstr. 29, *Stuttgart-Cannstatt,* pri ĉiuj lab. temoj, L, PK, PI, bfl, k. ĉ. l.

— K-dino *Lottchen Braune, Leipzig-Sellerhausen* Geisslerstr. 1. I. dez. koresp. per PI kun eksterlandanoj.

— K-do *Alfred Just,* Hohenheimerstr. 54, *Stuttgart,* pri ĉiuj lab. temoj, pref. pri komunismo, L, PK, PI, bfl, k. ĉ. l.

— K-do *Karl Bretzel,* Hasenbergstrasse 72, *Stuttgart,* pri ĉiuj lab. temoj, L, PK, PI, bfl, k. ĉ. l.

— K-do *Albert Schmid,* Lazarettstrasse 32, *Stuttgart - Cannstatt,* serĉas gekoresp. por siaj 15 gelernantoj. L, PK, PI, bfl, pri ĉiuj temoj lab. k. ĉ. l.

Hungario.

— K-do *Emeriko Grünhut,* Hársfa, 39, fsz. 13, *Budapest, VII,* dez. koresp. PI, k. ĉ. l.

Sovet-Unio.

— K-dino *A. N. Cvetajeva,* instruistino de novaj lingvoj, 3-a, Soveta Lernejo, 2-a ŝt., *Ivanovo-Voznesensk,* pri instrumetodo kaj edukado k. ĉ. l.

— K-dino *Larĉenko E. P.,* 1-a Grajdanskaja, 11, *Moskvo,* pri instruado de manlaboro al blinduloj. Ĉiam respondas.

— K-dino *Klimova M. A.,* Mal. Bronnaja, 15, kv. 41, *Moskvo,* pri edukado de blinduloj. Ĉiam akurate respondas.

— K-do *Kuzin Bazilo,* Narkomzem Uzb-SSR, *Taŝkent,* pri div. temoj k. ĉ. l. L, PI, bfl

— K-do *Miŝkin Georgo,* Rjadovskaja, 21, *Taŝkent,* pri divers. temoj k. ĉ. l. L, PI, bfl. Preferas bildojn pri popolmoroj, kutimoj, vestoj, tipoj ktp.

Svedio.

— K-do *John Nilsson,* Box, 26—100, *Bromölla,* dez. koresp. kun kamaradinoj pri virino k. komunismo k. t. p. interŝ. PI, fot-aĵojn

Grava Anonco

Radio-Stacio de laboristaj sindikatoj en Moskvo aranĝas radioparoladon por eksterlando en Esperanto

20an de Aprilo nunjara MGSPS (Moskva Gubernia Intersindikata Komitato) aranĝas per sia stacio "Sokolniki" (ondlongo 1010 m.) radioparoladon en esperanto, speciale destinitan por eksterlandaj laboristoj:

La raportojn faros:

1. K-do A. V. Vinogradov (prezidanto de Radio-fako de MGSPS) pri la temo "Brodkastmovado en S. S. S. R."

2. K-do P. F. Jakovlev pri la temo "Printempa festo Pasko". La raportoj okazos je la 7—8 vespere laŭ M. E. T. (Mez-Eŭropa Tempo). *Viktor Javoronkov*

Neuzitajn manuskriptojn ni ne resendas — Represo de artikoloj permesata nur, se oni citas la nomon de nia organo kaj sendas al Red. du ekz. de la represaĵo.
Jarabono: **Argentino** 6 pesos; **Aŭstrio** 120000 kr.; **Belgio** 36 fr.; **Brazilo** 13 milr.; **Britio** 110 penc.; **Bulgario** 220 lev.; **Ĉekoslovakio** 60 kr; ĉ.; **Danio** 10 kr. d.; **Estonio** 650 mk.; **Finnlando** 70 mk.; **Francio** 35 fr. fr.; **Germanio** 8 mk. or.; **Hispanio** 13 peset., **Hungario** 8 kr. or.; **Italio** 36 lir.; **Japanio** 4.50 jen; **Jugoslavio** 130 din.; **Litovio** 16 lid.; **Nederlando** 6 guld.; **Norvegio** 14 kr. norv.; **Polio** 8 zlot.; **Portugalio** 40 esk.; **Rumanio** 350 lej. **Rusio** 4 rubl. or.; **Svedio** 8 kr. sved.; **Svisio** 10 fr. svis.; **Usono** 2.50 dol. — **Ankaŭ 1/4 jare abonebla. Ponumera prezo:** 0.20 mk.

Presejo: UNS-PRODUKTIVGENOSSENSCHAFT, LEIPZIG